



*Gajnintoj de la fotokonkurso: unua premio por Marija Belošević (HR) (supre), dua premio por Sonia Daubercies (CH) (sube).
Bv legi la prian artikoleon en paĝo 33.*



Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Pona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹AdE – Akademio de Esperanto

Titolpaĝe: Omaĝo al Jozefo NÉMETH,
nia redaktoro. Li deĵoras ekde 20
jaroj! Ni volas danki lin. (La titol-
paĝan salutkarton subskribis la parto-
prenantoj de la Pedagogia Tago
organizita de ILEI-HU la 25-an de
oktobro 2014.)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Se vi membras en ILEI, se vi abonas nian organon *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR), vi ricevas ĝin kvarfoje jare akurate. Tio okazas danke al la laboro de Jozefo NÉMETH, nia redaktoro. Al li venas tekstoj el diversaj mondopartoj, al li apartenas la tasko rilati kun la prezidanto pri tiuj tekstoj. Rapide kaj efike li enpaĝigas la elektitajn artikolojn laŭ la maksimuma dikeco de la revuo, kiun postulas la prezo de la afranko el Belgio, FEL, al la tuta mondo. Ekde 20 jaroj Jozefo zorgas pri tiu laboro por nia Ligo. Ni danku lin!!!

En tiu ĉi numero vi povos malkovri informojn kaj faktojn pri la abunda subteno de hungaraj esperantistoj al nia Ligo tra la jaroj, ekscii, kiel salti de balbutado al flua parolado, vi legos pri fruktodonaj kursoj kaj kunvenoj, vi certe partoprenos la venontan Esperanto-Sumoon post legado de la priskribo fare de ĝia respondeculo HORI Jasuo (kiel mi faras nun). Eĥoj aperas el Orienta Timoro, Ĉinio, Japanio, Germanio, Slovakio, Hungario, Italio. La Ligo estas tutmonde aktiva.

4 numeroj de *Juna Amiko* aperos en 2015. Nepre abonu tiun valoran instru-helpilon!

Venas la jarfino. ILEI bezonas vian agadraporton, tio estas, ke la sekcioj devas raporti, same la reprezentantoj. Tiel la Ligo povos raporti al ekstermovadaj institucioj, kun kiuj ĝi estas en kontakto. Viaj raportoj estas niaj argumentoj.

Mi deziras al vi agrablan legadon!

Mireille GROSJEAN

Prez de ILEI

ENHAVO

Mireille GROSJEAN: <i>Enkonduko</i>	3
<i>Jozefo Németh redaktas nian revuon de 20 jaroj</i> (M. GROSJEAN, K. KOVÁTS)	5
József NÉMETH: <i>40 jaroj de ILEI-HU, hungara sekcio de ILEI</i>	7
HORI Jasuo: <i>Esperanto-sumoo por nia glora estonteco</i>	13
Rob MOERBEEK: <i>Falsaj amikoj en la hispana (2-a parto)+korektoj</i>	17
Heidi GOES: <i>Plia instruado en Orienta Timoro</i>	19
Bill M. MAK: <i>Lernado kaj instruado de Esperanto en Azio</i>	23
<i>El la landoj kaj sekcioj</i>	27
– Ĉinio: <i>Kursoj en Siano</i> (GONG Xiaofeng).....	27
– Germanio: <i>Helpu por nova biblioteko / SALO 9</i> (Zsófia KÓRÓDY)	28
– Italio: <i>Esperanto kaj novaj teknologioj</i> (Mirella DE MARTINI)	29
– Japanio: <i>La 4a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA)</i> (ISIKAWA Tiekō)	30
– Kroatio: <i>Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo</i> (József NÉMETH)	31
– Slovakio: <i>Poezia SES-umado</i> (Magdaléna FEIFIČOVÁ).....	32
Mireille GROSJEAN: <i>Pri la fotokonkurso</i>	33
<i>Kalendaro</i>	34
<i>La 48a konferenco de ILEI: programo, aliĝilo</i> (Radojica PETROVIČ).....	36
<i>Informoj pri ILEI</i>	41

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 7969 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Reprezentanto de ILEI ĉe UEA.

Vicprez.: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso hejmaj: (+49) 5521-5983. E-centroj, ekzamenoj, ALTE.

Vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitatoj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Sekretario: Radojica PETROVIČ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. hejma (+381) 32 371053. Konferencoj, rilatoj kun TEJO.

Vicsekr.: Magdaléna FEIFIČOVÁ „Fejfi”, Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.officejo@gmail.com>. Membro-administrado. Rilatoj kun FEL.

Estrarano: Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. Tel. (+1) 620 9877. <nespa.1990@gmail.com>. Universitatoj. Komisiito por helpi al aliĝpetoj.

Estrarano: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.

Kalendaro, ekzamenoj, multlingva paĝaro www.ilei-mondo.info, varbado.

Estrarano: Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Lerneja agado.

Pri IPR: Jozefo Németh redaktas nian revuon de 20 jaroj!! Ni festu lin!

Jozefo kaj mi (Laŭ *Esperanto kaj mi* de HORI Jasuo)

Katastrofo! Katastrofa estis la komenco de nia kunlaboro. Mi ne konas persone Jozefon, same li ne min. Post julio 2013 venis por li nova prezidanto kaj por mi nova kunlaboranto; ni devis kaj devas kunlabore prepari kvar numerojn jare de nia revuo. Mi jam verkis por IPR, mi regule legis ĝin, mi sciis, ke sekvi la redaktadon estos unu el miaj prezidantaj taskoj. Katastrofa estis la komenco; fakte samtage kiel la redaktofino mi ricevis dokumenton, kies titolo estis 2013/3, do temis pri la tria numero de nia revuo. Mi komencis korekti sufiĉe ĥaosan amason da tekstoj: titolo iru maldekstren, litertipo estu xy..... tie mankas la retadreso de la aŭtoro.... tie vi devas substreki la titolon same kiel tie... Post kelkaj horoj mi sendis la korektitajn du-tri paĝojn al Jozefo. Tamen la dokumento sendita de li al mi entenis la ricevitajn artikolojn cele al legado, aprobo, amputo, rifuzo, prokrasto, felietonigo, resumo... ne engaĝigo!! Do tiam li detale priskribis tion, kion mi devas fari unue, poste, fine. Fine venas tiu kontrolo de harmonia aspekto, kiun mi volis trakti komence. Ni devis iom post iom harmoniigi nian kunlaboron. Mi faris proponojn pri modifoj; kelkajn li akceptis, kelkajn li malkonsilis per tre detalaj kaj trafaj argumentoj kaj konvinkis min. Mi laboras kun kvar diversaj redaktoroj kaj certe Jozefo estas por mi tre ŝatata redaktoro (samkiel Stano MARČEK, kiu zorgas pri *Juna Amiko*): kun Jozefo nia taskodivido estas klara, nia komunikado estas trafa, konciza kaj pozitiva. Li lasas al mi la decidojn: ĉu submeti al la aŭtoro denove, ĉu rifuzi, ĉu prokrasti... Li atentigas min pri diversaj aspektoj teknikaj, enhavaj, tempaj. Redaktoroj estas tre diversaj; kiu decidis pri kio... kiu faras kion... Se redaktoro estas diktatoro, kiu konsultas nenium, la afero ne glatas por la asocio... La revuo IPR estas la organo, la voĉo de la Ligo, do la enhavo estas grava aspekto, kiu ĉefe kuŝu en la mano de la prezidanto. Pro tio, ke *Juna Amiko* ne estas la organo de



la Ligo, mia kunlaboro kun Stano havas alian guston. Por revuo de instruista Ligo la kvalito de IPR enorme gravas. Niaj legantoj poluras siajn lingvokapablojn legante IPR-n. Jozefo havas atentemajn okulojn al lingvaj kaj grafikaj aspektoj. Poste sekvas tri korektantoj cele al aperigo de perfektaj tekstoj. Elkora danko iru al ili: Luigia OBERRAUCH MADELLA, Luiza CAROL kaj Rob MOERBEEK. Ĉu ni sukcesas eldoni seneraran revuon? Mi tre esperas.

Do Jozefo! Koran dankon pro via valora laboro! Jam de 20 jaroj vi zorgas pri nia revuo!! Gratulojn!! Mi esperas, ke la Ligo povos ankoraŭ longe tiom fidele kaj efike kunlabori kun vi kaj mi esperas, ke iam ie ni renkontiĝos!!!

Malfermaj leteroj por la redaktoro

Kara Jozefo,

En la nomo de ĉiuj Esperanto-instruistoj, abonantoj kaj legantoj de IPR, kaj membroj de edukado.net mi kore salutas vin okaze de la 20-a jardatreveno de tio, ke vi estas nia redaktoro. Ni kore dankas vin pro la farita laboro, per kiu vi disponigas al ni valorajn materialojn. Ni tre apreas, ke dum tiu periodo la revuo ĉiam seninterrompe kaj akurate aperis.

Kaj jen miaj privataj pensoj, kara Jozefo:

Mi kiel via instruistino en la E-fako en Szombathely (1991-1994, *vd. la sekvapaĝan foton*) tre fieras pri vi kaj via laboro. Kiam antaŭ 20 jaroj necesis, ke iu pluportu la torĉon kaj IPR ne perdiĝu, mi proponis vin kiel redaktoron, konante viajn kvalitojn. Mi ne eraris. La iama diligenta studento, kiu ĉiam strebis je precizeco, akurateco kaj bona laboro, same agis ankaŭ kiel redaktoro de IPR. Kvankam mi en la unuaj 10 jaroj kiel vic-redaktoro staris apud vi, la plimulton de la taskoj ĉiam vi faris. Viaj praktika laboro kaj spertoj, kiel tiuj de instruisto de E-o en elementa lernejo, tiuj de organizanto de deklamkonkursoj kaj internaciaj klasintersaĝoj, kursoj kaj aliaj programoj donis al vi vastajn okulojn por rimarki kaj apreci la multflankan laboron de niaj kolegoj dise en la mondo. Tial ni havas en IPR teoriajn artikolojn, raportojn pri eventoj kaj priorganizajn materialojn en bona proporcio. Vi estas unu el inter ni.

Mia persona deziro por la bono de la komunumo estas, ke vi restu ankoraŭ longe la redaktoro, scivolu elprovi novajn vojojn kaj formojn kaj kuraĝu

intertrakti kun la kolegoj laŭ iliaj meritoj kaj malfortoj, por povi atingi la komunan celon.



Parto de la studentoj de la E-Fako en Szombathely kun la ricevitaj mezgradaj ILEI/UEA-diplomoj en 1991 (de maldekstre): Ildikó Renge, Istvánné Magyar, János Kirsch, Tibor Budai, Katalin Kováts, Csaba Németh, József Németh, Attiláné Kovács, Judit Nehéz.

Nun mi kaptas la okazon publike anonci, ke agnoskante vian 20-jaran laboron por IPR mi la 15-an de Decembro 2014 enirigas vin en la Panteonon de *edukado.net*, por ke vi estu inter la meritplenaj E-instruistoj, pri kiuj ni fieras kaj memoru ĉiam. Bonvenon.

*Amike, viaj eksa intruisto kaj kunlaboranto ĉe IPR, sed eterna amikino,
Katalin KOVÁTS*

40 jaroj de ILEI-HU, hungara sekcio de ILEI

Komencoj: La unuan mencion de nia sekcio mi trovis en IPR 1974/1. Tiam la sekcion gvidis Marta CSER. En 1978 la gvidado transiris al la eminenta kolegino Zsuzsa BARCSAY, kiu estris la sekcion ĝis 1984. Laŭ la numero IPR 1985/1, komence de 1985 ni ne havis sekcion (almenaŭ sekciestron ne). Sed jam en IPR 85/2 ni reaperas: la torĉon prenis tria eminentulo, Márta KOVÁCS.

IPR kaj ILEI-HU: Dum la lastaj 30 jaroj ILEI, kaj ene de ĝi IPR, forte ligiĝas al la hungara sekcio kaj hungaraj esperantistoj. En 1985 ILEI ekhavis tute novan estraron, la prezidanto iĝis hungaro, István SZERDAHELYI, la fondinto kaj gvidanto de la E-fako de ELTE (*Eötvös Loránd Tudományegyetem*) en Budapeŝto. Ekde la numero IPR 1986/1 la revuon redaktas hungaroj. La unua en la vico estis István SZERDAHELYI. Dum tri sinsekvaj jaroj ILEI perdis tri gravajn kolegojn: en 1985 forpasis nia sekretario Mario DAZZINI, en 1986 la pli frua prezidanto Helmut SONNABEND kaj en aŭgusto 1987 forlasis nin ankaŭ István SZERDAHELYI. Sed la redaktadon li transdonis al sia disĉiplo István ERTL jam komence de 1987. Laŭ la numero IPR 90/2 aperas alia hungara ILEI-ano en la redakta teamo (kiel teknika redaktisto): Stefan MACGILL, tiama vicprezidanto de ILEI. Ekde la n-ro 91/2 aperas plia hungaro ĉe IPR: Márta KOVÁCS, kiel dua teknika redaktisto. La unua prezida periodo de Stefan MACGILL estis en la jaroj 1991-1993. Ekde la numero IPR 92/1 Márta KOVÁCS estas jam redaktoro, ŝian laboron helpas Stefan MACGILL kiel vicred. (István ERTL tiam iĝis redaktoro de *Esperanto*). Márta KOVÁCS redaktis 11 numerojn, sed fine de 1994 pro personaj kialoj ŝi devis rezigni. IPR 94/4 pretiĝis fare de Stefan MACGILL. Aŭtune de 1994 ILEI-HU havis kunvenon kaj la ĉeestantaj funkciuloj transdonis la redaktajn taskojn al kvina hungara redaktoro Jozefo NÉMETH. Tio estis antaŭ 20 jaroj. Mian laboron 11 jarojn longe helpis la sesa hungara redakciano Katalin KOVÁTS, kiel vicredaktoro. Sed dum tiuj 20 jaroj ankaŭ aliaj hungaroj helpis min, i.a.: Ervin FENYVESI, Mónika MOLNÁR, Géza KURUCZ, Johano KIRSCH, Blazio VAHA. Ekde 2004 ni havas redaktan komitaton kaj titolpaĝe ni listigas ĉiujn kunlaborantojn de la aktuala numero.



*[Márta KOVÁCS salutas min en la nomo de ILEI-HU okaze de la jubileo.
En mia maldekstra mano estas la salutkarto videbla titolpaĝe.]*

Revenante al ILEI-HU mem: Post iom pli ol 15 jaroj da ekzisto fondiĝis la jure registrata asocio *Eszperantista Pedagógusok Magyarországi Egyesülete* (EPME, Asocio de Esperantistaj Pedagogoj en Hungario) antaŭ 25 jaroj

en 1990 (la ŝtata agnosko datiĝas en februaro 1991), la estraron gvidis Márta KOVÁCS. En 1990 ni estis unu jaron post la reĝimŝanĝo, Esperanto prosperis en la lernejoj. Anstataŭ la rusa, kaj manke de instruistoj pri la germana kaj angla, plurcent bazlernejoj elektis Esperanton kiel la unuan (kaj solan!) fremdlingvon. Nur en mia urbeto Pápa (kun 30 000 loĝantoj) en du lernejoj komencis lerni ĝin 120 infanoj (en la 4-a klaso). En mia lernejo estis 70 gelernantoj en tri klasoj. Ili lernis la lingvon 5 jarojn longe. Post la fino de la studado 9 lernantoj trapasis mezgradan ŝtatan lingvoekzamenon. Dum la 10 jaroj de la E-instruado en nia lernejo en la 4 diversaj landaj konkursoj ni akiris 17 unuajn lokojn. (Pri du konkursoj el inter tiuj 4 vi povas legi du artikolojn¹ de Géza KURUCZ en IPR).



Partoprenantoj de la Pedagogia Tago de ILEI-HU (25 Oktobro 2014, Budapeŝto)

¹ Géza Kurucz: Konkursoj, kiujn aprobis la praktiko. IPR 1995/1 p. 16-18.; 1995/2 p. 30-32.

En la lernojaro 1991/92 en Hungario Esperanton lernis 740 bazlernejanoj, 680 mezlernejanoj kaj 170 studentoj en altlernejoj kaj universitatoj. Sed 5 jarojn poste la cirkonstancoj ĉiam pli kaj pli malboniĝis kaj nuntempe la enlerneja E-instruado preskaŭ ne ekzistas en Hungario. Ni nepre menciuj, ke ĉiujare plurmil plenkreskuloj trapasas mezgradan ekzamenon pri E-o, ĉar laŭ hungaraj leĝoj sen lingvokono oni ne rajtas ricevi universitatan diplomon. E-o estas la tria plej granda lingvo post la angla kaj germana el tiu vidpunkto. Sed el tiuj plurmil preskaŭ neniu eniras la movadon. (Ili donos almenaŭ laboron al multaj hungaraj E-instruantoj, sed granda parto de tiuj kolegoj ne membriĝas en ILEI-HU.)

5 jarojn post la fondiĝo ankaŭ ILEI-HU travivis krizon. La asocio havis ŝuldojn, administrajn kaj financajn problemojn. En 1995 la sekciestro, pro personaj malfacilaĵoj volis ĉesigi la laboron, sed ni ne sukcesis trovi novan sekciestron, do, provizore ŝi restis unu jaron pli. En 1996 la asocion minacis malfondiĝo. Por savi la situacion unu jaron post la transpreno de la redakta laboro mi transprenis ankaŭ la gvidadon de la asocio. Post persista – komence senespera – laboro mi sukcesis atingi, ke oni nuligis niajn ŝuldojn, kaj anstataŭ pagi monpunon, ni eĉ ricevis monon. La financa stato de nia asocio ekde tiam estas stabila.

Pri la membraro: en 1996 mi heredis la dokumentojn de nia sekcio, precipe tiujn, kiuj naskiĝis post la oficiala fondiĝo en 1990, mi fosis profunde, ne senrezulte kaj trovis indikojn pri parto de la komencaj jaroj. En la n-ro 1991/2 mi trovis artikolon² de Bertil ANDREASSON pri la jaroj 1984-1990 (interkrampe la membronombroj). 1984 (3), 1985 (10), 1986 (47), 1987 (31), 1988 (42), 1989 (40), 1990 (53).

Notoj: 1) Rigardante la ciferojn oni povas supozi, ke en la komencaj 10 jaroj de nia ekzisto la membronombro estis sub 10^3 . 2) En la sama numero nia sekciestrino Márta KOVÁCS aperigis detalan analizon⁴ pri tiuj 11 sekcioj, kiuj resendis la jaran demandilon. Interese, ke en ŝia analizo ILEI-HU havas 57 membrojn, kaj ne 53 kiel ĉe Andreasson. La malsamaj ciferoj tie kaj en mia suba analizo povas veni el la faktoj, ke kelkaj kolegoj membriĝis en la hungara sekcio, sed ne en ILEI mem, krome, kelkaj abonis


² Bertil Andreasson: Evoluo de la membraro de ILEI. IPR 1991/2 p. 38-39.

³ La varbadon de hungaroj malfaciligis ankaŭ la problemoj pri la transpago de kotizoj. Laŭ: Márta Kovács: La lastaj dek jaroj de ILEI. IPR 1987/ p. 2-8.

⁴ Márta Kovács: Pri la sekcioj de ILEI en 1990. IPR 1991/2 p. 22-24.

IPR-n, sed ne membriĝis en la asocio. Laŭ nia statuto, plenrajta membro devas esti ankaŭ membro de ILEI, tiel instigante la kolegojn aparteni al ILEI. Tiujn, kiuj ne membriĝas en ILEI, ni nomas „apogantaj membroj” kaj ili ne havas voĉdonrajton en niaj jarkunvenoj.

Traserĉadi la asocian arkivon ne estis facila afero, sed mi faris tion nun por vi, kaj trovis la jenajn indikojn⁵ pri nia membraro en la pasintaj 30 jaroj: 1985 (11), 1986 (47), 1987 (38), 1988 (56), 1989 (46), 1990 (63), 1991 (53), 1992 (60), 1993 (68), 1994 (45), 1995 (45), 1996 (35), 1997 (42), 1998 (43), 1999 (45), 2000 (39), 2001 (49), 2002 (45), 2003 (38), 2004 (39), 2005 (41), 2006 (46), 2007 (55), 2008 (57), 2009 (58), 2010 (61), 2011 (57), 2012 (56), 2013 (56), 2014 (46).



Do, la suma membronombro de ILEI-HU en la lastaj 30 jaroj averaĝe estas 48 (kune kun la nur-enlandaj membroj). (*Vidu la grafikaĵon!*) La statistiko

⁵ Post tiom da jaroj ne ĉiam estas facile kompreni la diversajn listojn kaj dokumentojn. Miaj ciferoj pri la membronombro, koncerne la komencan periodon, kiam la sekcion gvidis ne mi, povas enhavi eraretojn.

enhavas ankaŭ la nur-enlandajn membrojn de EPME! Ekz. en 2013 el la 56 membroj nur 51 membriĝis ankaŭ en ILEI.

Pluraj iamaj eminentuloj jam forpasis, i.a. Zsuzsa BARCSAY (2000), Zsuzsa CSISZÁR (2002), Tibor PAPP (2003), Gabriella ŐSZ (2003), Balázs SZEMŐK (2005), Tivadar KERESZTHEGYI (2006), János SÁRKÖZI (2007), Johano KIRSCH (2012), Péter András RADOS (2012), Ernő KÖNCZÖL (2014).

Vivante eksterlande kelkaj iamaj membroj fortigas aliajn sekciojn de ILEI: ekz. Ilona KOUTNY en Pollando kaj Zsófia KÓRÓDY en Germanio. Aliaj eminentaj „elmigrintoj” restis fidelaj al ILEI-HU: vd. Mónika MOLNÁR en Svislando kaj Katalin KOVÁTS en Nederlando.

Pri la agado de nia sekcio: la 45 jarkolektoj de IPR inter 1970 kaj 2014 abunde raportas pri la sekcia agado, kaj eĉ pli abunde pri la persona, ekstersekcia agado de niaj membroj. Estus vana kaj superflua peno nun kolekti ilin, sed se vi tamen interesiĝas pri la temo, komencu la serĉadon per la trastudo de la ekzistantaj indeksoj de IPR⁶. La plej grava kaj ofte preskaŭ la sola komuna aranĝo estas la landa pedagogia tago. En la jaro, kiam nian asocion oni jure registris, oni jam organizis la 6-an pedagogian tagon, kun 48 partoprenantoj. La komencajn 6 pedagogiajn tagojn organizis Hungara E-Asocio (HEA), sed ekde la jaro 1992 ILEI-HU transprenis la organizan taskon. Tiuj aranĝoj (fakte konferencoj, seminarioj) ofte estis dutagaj. En 2004 ni interkonsentis, ke ili okazu dufoje jare. En 2008 ni jam organizis la 24-an pedagogian tagon. (Poste ni ne plu numeris la tagojn.)


Konkursante por subvencio⁷ en 2006 ni gajnis monon kaj eldonis libron kun la titolo *Magyar Eszperantó Tanítók Arcképcsarnoka* (Portretaro de Hungaraj E-Instruantoj), kiu helpas la kontaktojn kaj informadon ene de la asocio. En la libro oni povas trovi ekz. la sekvajn indikojn: naskiĝdato, loĝ-adreso, telefono, retadreso, hejmpaĝo, profesio(j), parolataj lingvoj, E-ekzamenoj, membreco en E-organizaĵoj, E-movada agado, E-instrua agado, proponoj por evoluigi la E-instruadon. Uzante la ricevitaĵajn subvenciojn ni aĉetis ankaŭ teknikajn ilojn. Alia entrepreno de la sekcio estis la eldono de

⁶ Kovács Márta: Indekso por la jarkolektoj de IPR 1980-1990. IPR 1991/1 p. 10-17; József Németh: Indeksoj por la jarkolektoj de IPR 1991-95. IPR 1996/1 p. 10-16; József Németh: Indeksoj por la jarkolektoj de IPR 1996-2000. IPR 2001/1 p. 22-31; József Németh: Indeksoj por la jarkolektoj de IPR 2001-2005. IPR 2006/1 p. 27-36.

⁷ Ĉe *Nemzeti Civil Alapprogram* (nacia civila fondaĵo)

disko „Esperantologiaj fragmentoj” memore al István SZERDAHELYI kaj Zsuzsa BARCSAY. Temas pri enkomputiligo de sonregistraĵoj de Zsuzsa Barcsay, kiujn ŝi faris en la jaroj 1972/1974 kiel studento de István Szerdahelyi. La sonmaterialo aperis sur diskoj kaj ĝi estas aŭskultebla ankaŭ rete⁸ en la hejmpaĝo de ILEI-HU. La materialon kompilis Márta KOVÁCS, la enkomputiligon kaj produktadon entreprenis József NÉMETH.

La lasta jarkunveno de ILEI-HU okazis la 25-an de oktobro 2014. Ni akceptis la raporton pri la pasintaj 3 jaroj kaj elektis novan estraron por la sekvaj 3 jaroj: Attiláné KOVÁCS, József NÉMETH (sekciestro), Pálma SALOMONNÉ CSISZÁR kaj Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ. Samtempe okazis Pedagogia Tago kun 35 partoprenantoj. Al la programo kontribuis: Iván BUJDOSÓ, Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ, Katalin KOVÁTS, Blazio VAHA, Pálma CSISZÁR SALOMONNÉ kaj László SZILVÁSI. Kadre de la evento ni transdonis la diplomon de UEA al Éva FARKAS-TATÁR [vd la foton], kiu jam ekde 50 jaroj estas membro de UEA. Krome la partoprenantoj salutis la sekciestron pro lia 20-jara jubileo kiel redaktoro de IPR.



József NÉMETH, Hungario

Esperanto-sumoo por nia glora estonteco

(Mallonga versio. Kompleta versio legeblas sur la retejo www.ilei.info)

Kio estas sumoo?

Sumoo estas japana tradicia lukto. La suba ukijo (lignopresaĵo) estis farita antaŭ 200 jaroj, sed ankoraŭ nun luktistoj luktas same kiel en ĝi. Luktisto venkas, kiam li faligas la konkuranton teren aŭ puŝas lin ekster la ringon. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭras 15 tagojn.

Lanĉo de Esperanto-sumoo

En la Esperanto-*sumoo* mi decidis jenajn regulojn:

⁸ <http://www.ilei.info/hungario/sonmaterialoj.php>.

1. Cel: Kutimigi esperantistojn legi libron kun ĝojo.

2. Reguloj

- 1) Laŭ sia kapablo partoprenantoj elektas libron, kiun ili legos dum tiu konkurso, kaj decidas, kiom da paĝoj ili legos por unu tago.
- 2) Se ili sukcesas legi pli ol promesitajn paĝojn ĝis la noktomezo de tiu tago, ili akiras unu venkon, se ne, unu malvenkon. Tiamaniere ili luktas kun la libro dum 15 tagoj. Ili luktas ne kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ si.
- 3) Venkon aŭ malvenkon la partoprenantoj mem juĝas.



Mi prove komencis E-*sumoo*-n en septembro 2009 inter japanaj e-istoj. 19 e-istoj partoprenis en ĝi. Mi havis la kredon, ke tiu *sumoo* estas inda kaj disvastigenda en la tuta mondo, do mi sendis la informon pri la *sumoo* al la tuta mondo, kaj en marto 2010 partoprenis 33 homoj el 9 landoj.

Progreso de la Esperanto-Sumoo

Dum la unuaj du jaroj la nombro de la partoprenantoj ne kreskis multe, sed en 2012 la nombro komencis kreski kaj ĝi atingis la pintan nombron 190 en januaro 2014. Nia retejo: <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Kiel dediĉas sin la Esperanto-sumoo al la Esperanto-movado?

1) Ĝi donas okazon al ĉiuj esperantistoj egale ĝui E-librojn

Iu E-organizo en Japanio rekomendas, ke ĉiuj membroj legu 1000 paĝojn jare, sed tia rekomendo tute ne estas plenumbla por komencantoj. Tamen

tiu ĉi E-sumoo donas al ĉiuj esperantistoj egalan eblecon ĝui E-librojn, ĉar ĉiuj rajtas decidi sian celon laŭ sia volo, ekzemple laŭ sia E-kapablo kaj laŭ siaj vivkondiĉoj.

Veteranoj promesu legi 20 paĝojn de malfacila libro kaj komencantoj promesu legi 1 paĝon de infanlibro, kaj ili, veteranoj kaj komencantoj, povas ludi aŭ lukti sur la sama bazo, nome kiam ili plenumos sian promeson, ili gajnas unu venkon, nur unu venkon por ĉiuj. Tiu egaleco estas tre grava.

2) La E-sumoo naskas solidaran senton inter la partoprenantoj

Mi dissendas liston de la partoprenantoj kun la informo de la libroj, kiujn ili legos. Ili sentas, ke ili legas librojn kun pli ol cent homoj en la tuta mondo kaj klopodas plenumi sian promeson. Certe tiu „grupa” legado donas al ili solidaran senton. Mi supozas, ke tia „grupa” legado en la tuta mondo neniam okazis en la monda historio.

3) La E-sumoo multe kontribuas al la libro-kulturo

Kiam la nombro de la partoprenantoj estas 100, la averaĝa sumo de legitaj paĝoj dum 15 tagoj estas 7500. Nun averaĝe la nombro de la partoprenantoj estas 150, do la sumo estas 11250 paĝoj. Se unu libro averaĝe havas 200 paĝojn, dum unu sumoo-periodo oni legas 56,25 librojn. Ĝis nun la entuta nombro de la partoprenantoj estis 2726, do la legitaj paĝoj estis 204 450, sekve legitaj libroj estis 1022. Ĉu tiu nombro ne montris grandan kontribuon al la libro-kulturo de Esperanto?

Kaj kiam mi vidis la liston de la legitaj libroj, mi miras pro la abundeco de la Esperanto-literaturo. Preskaŭ ĉiuj legas malsamajn librojn!

Jen komentoj de partoprenantoj

Pollando: Mi estas feliĉa, ke mi partoprenas en la Esperanto-sumoo. Dank' al ĝi mi komencis legi librojn, kiuj longe kuŝis sur mia breto. Mi tre dankas pro la diplomoj, kiujn mi ricevis. Partoprenado en la sumoo estas por mi granda plezuro, tial mi volas denove esti luktistino en venontaj sumooj.

Japanio: Sumoo estas admirinda, valora movado por Esperantujo. De la rezultaro mi ekspluatas la librojn, kiujn aliaj partoprenantoj legis, ĉar mi deziras trovi interesajn librojn por la venonta sumoo.

4) La E-sumoo multe kontribuas al plialtigo de la E-kapablo de e-isto

Certe la kapablo de la partoprenantoj altiĝas. Jen kvar partoprenantoj atestas mian supozon:

Pollando: *Mi trovis, ke la E-sumoo estas tre bona, ĉar dum la sumoo-legado mi devis esti pli diligenta kaj mi legis tiom da libroj, kiom mi ne legis antaŭe. Mi rimarkis, ke mia vortprovizo post ĉiu lukto estas pli riĉa ol antaŭe. La legado estas bona ekzercado por plibonigo de miaj lingvoscioj.*

Nederlando: *La konkurso estis ekstra instigo por mi ĉiutage legi kelkajn paĝojn en Esperanto-libro de mia elekto. Kaj atendas tiom da aliaj verkoj.... Mi spertis, ke ĝi kontribuas al pli profunda scio de la lingvo E-o, certe kiam oni legas literaturon, en kiu estas uzataj maloftaj vortoj kaj esprimoj. Oni legante ekzercas. Tamen mi foje intencas ankaŭ laŭtelegi, por akiri pli fluan elbuŝigon de komplikaj vortoj...*

DR Kongo: *Jen mi finis mian libron. Antaŭe mi ne povis paroli en Esperanto, sed dank' al sumoo, kun helpo de nia gvidantino, mi nun kapablas paroli Esperante.*

Francio: *Mi deziras klarigi, kiel mi legis dum tiu ĉi sumoo. Mi sekvis tian metodon: unue, kiam mi ne komprenis vorton, mi notis ĝin por, poste, serĉi la difinon; due, mi notis bele verkitajn frazojn, esprimojn aŭ tekstpartojn; trie, mi notis ne komprenitajn vortojn aŭ esprimojn, kiujn mi ne trovis en la vortaro. Rilate al la du lastaj punktoj, mi deziras partoprenigi e-istajn geamikojn, ekz. dum la kurso de Esperanto en nia klubo.*

5) Partoprenantoj progresas ne nur en E-o sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo

Por venki 15 tagojn ni devas estis atentemaj. En nia ĉiutaga vivo atendas nin neantaŭvidataj malamikoj, kiuj malhelpas nin legi. Ni devas plani bone por disponi tempon por la legado. Ni devas vivi celkonscie. Ĉi-sube du vjetnamoj skribas pri tiu afero:

Mi tre kontentas pri la sumoo. Partopreninte ĝin, mi vidas, ke mia E-o verŝajne pliboniĝis, kaj mi tre ĝojas pro tio. Komence de la sumoo, mi pensis, ke „ĉiutage mi klopodos plenumi mian planon kaj estos sufiĉe legi tiom da paĝoj, kiom mi promesis”. Sed poste, mi legis pli multe da paĝoj ol mi promesis, ĉar mi sentas, ke legi libron estas tre utile por plibonigi lingvokapablon, kaj la enhavo de la libro interesis min. Mi pensas, ke homoj agu ne per promeso kun aliaj aŭ reguloj, sed nur amegu la aferon,

tio sufiĉas. Por mi, venko en la sumoo estas ankaŭ venko kontraŭ mia pigro (mi estas pigrulino). La sumoo jam finiĝis, sed mi klopodos daŭre legi libron ĉiutage kaj faros ĝin kiel mian kutimon kaj ŝaton.

La plej danĝera kontraŭulo estas mi mem. Mi devas lukti kontraŭ mia mallaboremo, kontraŭ dormemo, malkoncentriĝo, kaj aranĝi mian tempon. Legi ne nur post laboro, tiam oni estas tro laca, sed legi inter du laboroj, por ŝanĝi la okupadon.

Fine

Jam pasis 5 jaroj post kiam mi komencis la Esperanto-*sumoo*-n. Mi nun legas la 49an libron el la 51 volumoj de *Plena Verkaro de Zamenhof*. Se mi ne komencus la *sumoo*-n, mi neniam povus legi tiom da volumoj. Mi estas certa, ke en 2015 mi finlegos la PVZ-on. Eble mi estos inter kelkaj homoj, kiuj tralegis la serion! Se mi povos eniri en la paradizon, certe d-ro Zamenhof kaj s-ro ITOO Kanzi atendos min kaj aplaudos min. Mi atendas tiun feliĉan tempon. Vere mirinda estas la E-*sumoo*! Kaj same multaj partoprenantoj de la *sumoo* sentas, legante dikajn librojn aŭ multajn librojn dormantajn en ilia libroŝranko. Laste mi aldonos mian revon pri la *sumoo*. Mi volas havi minimume 500 partoprenantojn. Tamen administri tiom da homoj estos malfacile por unu homo, do mi esperas, ke en multaj landoj oni organizos sian *sumoo*-n. Se ni sukcesos havi 500 aŭ 1000 partoprenantojn, la Esperanto-movado draste ŝanĝiĝos kaj ni povos antaŭvidi gloran venkon en nia estonteco. Mi atendas vian kunlaboron por tiu venko.



HORI Jasuo

Falsaj amikoj en la hispana

Gardu vin antaŭ duonamikoj! (2-a parto)

- | | |
|-----------------------------|-------------------------------------------------|
| 46. kion tio implikas? | implicar= impliki; implici |
| 47. tio incitas la apetiton | inciti= kolerigi; incitar= eksciti, inciti |
| 48. atentu: inklinu vin | inklini estas netransitiva; inclinarse= kliniĝi |

49. mi interesas min por libroj	mi interesiĝas pri libroj/min interesas libroj
50. troa intereso	intereso: intereso, interezo, procentaĵo, rentumo
51. ĉu vi vidas la irison?	iris= ĉielarko
52. mi ĝuas juron de unu jaro	juro= proprieto, pensio
53. oni lanĉas balojn	lanzar= ĵeti, pafi; balo= kuglo
54. li perdis la konsciencon	(al la diablo?): conciencia= konscienco; konscio
55. konduitu vin dece	konduiti estas netransitiva; konducirse= (sin gvidi) konduiti
56. lia konferenco estis korta	conferencia= konferenco/prelego; corto= mallonga
57. sed plena je konceptoj	concepto: koncepto, opinio, spritaĵo
58. kilo da pomoj	kilo= kilogramo; quilla= kilo
59. liter-portistoj	ŝajne leter-portisto, sed litera= port-lito
60. majstro aŭ profesoro	maestro= ĉefo/instruisto; profesor= profesoro/docento/instruisto
61. magistrato kun maroto	juĝisto kun virvirino (vireska virino)
62. kio motivis la akcidenton?	motivar: motivi, klarigi; kaŭzi
63. Bv provi vian tezon!	provar= provi, pruvi
64. Ne tentu!	tentar= tuŝi, tenti
65. kulpi je robo	ŝtelo
66. Mi sentis ke vi pravas	sentir= senti, pensi, opinii
67. servi la societon	sociedad= socio, societo
68. Morgaŭ estos brila tempo	tiempo= tempo; vetero
69. Troa volumo por mia valizo	volumen= volumo (de libro), volumeno
70. spirita alimento	alimento= nutro, alimento.

Kaj eblas aldoni amason da aliaj ekzemploj.

Korektoj de hispanlingvano al la 1-a parto (vd IPR 2014/3 p. 20)

Dank' al la atento de nia amiko Carlos Hernandez eblas postkorekti la 'falsajn amikojn', kiuj povas embarasi hispanlingvanojn aŭ lernantojn de la hispana.

6. Asistir estas la ĝusta formo de la verbo kun pluraj signifoj: asisti kaj ĉeesti.
7. Atender kutime signifas 'flegi, zorgi'. Tamen ankaŭ 'atenti' laŭ la vortaro de F. de Diego. (FD)
10. La formo de la (fajngrajna) fajlilo estas 'bastarda' (FD); la ĝenerala vorto estas 'lima'.
12. 'Bordo' normale estas samsignifa, sed 'borda' estas sinonimo de 'cabaña' (FD)
15. Evidente 'censurar' estas kaj 'criticar' kaj 'reprochar'. (FD)
16. Ĉi tie mi konfuzis la vortojn: demandar (jur.: plendi, FD) kaj preguntar (demandi)
17. Eĉ pli erariga estas kien/quién (=kiu). Multaj latinidanoj tamen misuzas 'derivi' anstataŭ 'deveni'.
22. Pruviĝas, ke 'jaro' en la senco 'rufulo' ne estas kutima vorto por ĉevalido/ĉevalaĉo.
37. Gesto en la senco 'faro/ĝesto' tamen ne estas rekomendinda.
45. Nek ignori en la senco 'ne scii'.

*Kun pardonpeto,
Rob MOERBEEK*

Plia instruado en Orienta Timoro

Dum la pasinta nordhemisfera somero mi troviĝis ses semajnojn en la suda hemisfero, el kiuj kvin semajnojn kaj unu tagon en Orienta Timoro. (Ankaŭ en 2013 mi estis tie – vidu IPR 2013 3 kaj 4). Krom vizitoj al diversaj instancoj, gazetoficejoj, bibliotekoj kaj gravuloj mi ankaŭ instruis. Ĉar aliloke jam aperas pli ĝeneralaj raportoj, mi raportos ĉi tie pli detale pri la instruado. En la unuaj semajnoj de mia restado mi sekvis ĉiu-matene kurson de la tetuna lingvo (ne semajnfine, entute ok fojojn). Mia kono de la tetuna



multe helpis al mi dum miaj lecionoj, ĉar ne ĉiuj ankoraŭ flue parolis la indonezian, kiun mi uzis por instrui. Ne taŭgis instrui per la portugala aŭ angla, kiun ili plej ofte parolis eĉ malpli ol la indonezian, sed foje mi ankaŭ bezonis tiujn lingvojn por traduki ion. Kvankam ili ne bone parolas la portugalan, pluraj portugalaj vortoj eniris la tetunan kaj foje mi povis klarigi ion per la portugala traduko. Sed la lernado de la tetuna ankaŭ helpis por korekti la gramatikon, kiun Teofilo, orienttimorano, kiu mem eklernis Esperanton, tradukis kaj kiun mi disdonis al miaj lernantoj. Temas laŭ mia scio pri la unua kursmaterialo publikigita en la tetuna. Kompreneble tiu lingvokono ankaŭ helpis por supraĵe kontroli tradukojn de artikoloj, kiujn mi verkis, aŭ de artikoloj, kiuj aperis pri mi en la gazetaro, aŭ por skribi kaj kompreni simplajn mesaĝojn en la tetuna en la *Facebook*-paĝo por Orienta Timoro.

La tagon post mia alveno mi vizitis la nacian radion, kie mi instruis ankaŭ pasintjare. Kvankam mi jam monatojn antaŭe provis fiksi la lecionhorojn por la radio, kaj malgraŭ tio, ke mi preferis instrui dum la laborsemajno, por povi iri al aliaj regionoj de la lando dum la semajnfino, nur ĉe mia vizito ni povis interkonsenti pri tio, ke mi instruos en sabato kaj dimanĉo... Bone, ke mi ne fiksas rendezuojn en aŭ vojaĝojn al tiuj aliaj regionoj! Entute mi instruis tie ses fojojn po du aŭ tri horojn. Partoprenis entute 24 homoj, kiuj ofte venis nur unu fojon. La kondiĉoj estis relative bonaj: granda tablo kaj bonaj seĝoj, blanka tabulo, printilo, interreto, sed ne estis projekciilo. Mi do uzis mian komputilon por montri prezentaĵojn aŭ filmojn, sed plej ofte uzis la blankan tabulon, sur kiu mi skribis, kaj kiam la lernantoj estis malmultaj kaj jam iom progresintaj, printaĵojn el lernolibroj por fari ekzercojn.

Nova instruejo por mi estis la lingva trejnadejo kaj studentejo *Lorico Training Centre*. La direktoro, Ozorio Leque, laboras kiel politika konsilisto ĉe la Ŝtatestrekariejo pri Junularo kaj Sporto, kiu subvencias la trejnadejon. La kabineteĉfo de tiu ŝtatestrekariejo rekomendis al mi instrui tie. Dekoj da studentoj loĝas en tiu ĉi centro, interalie parto de miaj lernantoj. Mi gvidis unu enkondukan lecionon, parte en la angla, kun traduko de Ozorio al la tetuna lingvo, kaj parte en la indonezia al minimume 43 homoj (mi ne certas, ĉu ĉiuj skribis sian nomon sur la listo). Pro tio, ke ili estis multaj, ni decidis havi du grupojn. Sed ĉe la 4-a leciono por grupo B evidentiĝis, kiel ni jam komencis suspekti antaŭe, ke tiu sistemo tute ne funkcias: venis ade malpli da homoj, sed tiuj venis ja ĉi-

foje... do de tiam mi ne plu ripetis la lecionon. Post la enkonduko mi gvidis ok lecionojn de po du horoj. Kvankam la salono havis blankan tabulon, projekciilon kaj grandan ekranon, la kondiĉoj en la klaso malfaciligis la instruadon: ĝi ne havis vitron en la fenestroj, kaj la du grandaj pordoj restis konstante malfermitaj. De ambaŭ flankoj daŭre venis bruoj de ludantaj infanoj kaj junuloj. Ne estis tabloj aŭ tabletoj por la lernantoj, kaj ili sidis sur plastaj seĝoj. Ofte ili uzis plian seĝon kiel tablon. En mia ege plena kaj streĉa lasta tuta tago mi ja planis ankoraŭ gvidi lastan lecionon, sed la Ministerio pri Edukado decidis alie: mia kontaktpersono diris, ke fine mi povos iri por renkonti la ministron, sed tio tamen ne veris. Mi jam sciigis per *Facebook*-mesaĝo kaj telefonvoko al diversaj homoj ke mi alvenos malfrue, sed fine mi alvenis malfruege: nur duona horo restis. Sed tiu tempo estis uzata por klarigi al la du ne-estranaj ĉeestantoj pri la fondo de la klubo, donaci ankaŭ al ili *Poŝamiko* [vd la *foton sube*], kaj respondi kelkajn demandojn de ili. Ili bedaŭris, ke mi devas jam foriri, ĉar ili dubas, ĉu ili povos lerni sen instruisto.



Ĉe la Forumo de la Ne-Registaraj Organizaĵoj (NRO) de Orienta Timoro (FONGTIL) mi povis post enkonduka vizito kaj vana vizito (la planita leciono tute ne povis okazi pro foresto de la respondeculo kaj ignorado

kaj/aŭ nescio de la aliaj) en septembro tamen komenci mallongan kurson de du lecionoj de po du horoj. Al la dua leciono venis jam malpli da homoj, sed pluraj novuloj envenis kvin minutojn antaŭ la antaŭvidita fino. Mi daŭrigis duonan horon, sed poste vere devis ĉesi. Komune al ĉiuj lecionoj estis, ke mi preskaŭ neniam povis komenci ĝustatempe, kaj ke kelkaj alvenis longe post la komenco de la leciono. Ĉe RTTL kaj LTC venis multe malpli da homoj al la lasta ol al la unua leciono. Kompreneble, oni sciis, ke homoj venas al la unua aŭ al iu el la unuaj lecionoj, simple por vidi pri kio temas. Nur tiuj, kiuj vere interesiĝas kaj havas tempon, venadas ĝis la fino. Ĉe la radio-prezentistoj ekzistis la problemo, ke pluraj el ili devis semajnfine iri al aliaj distriktoj aŭ eĉ al Indonezio (Okcidenta Timoro) por fari radio-raportojn. Aliaj, kiuj laboris ĉe Alola, komune iris por tuta semajno al Atauro.

Aliaj havis funebran ceremonion. Tiajn kialojn mi eksciis kutime poste, nur escepte antaŭe. La novuloj estis bonvenaj, sed malfaciligis bonan progresadon por la tuta grupo. Iun bazon ili ja bezonis kaj do mi devis doni ĝin, ĉar frustritaj pro nekompreneo ili certe ne revenus. Ofte ja la ripeto utilis ankaŭ por la aliaj, sed kiam en la kvara leciono alvenas unu novulo (tio okazis kaj ĉe la radio, kaj ĉe LTC), tio malfacilas. Alia problemo estis, ke sufiĉe ofte la elektro forfalis, precipe ĉe LTC kaj Fongtil; ĉe la radio laŭ mia memoro nur unu fojon. Iel ajn, mi devis adapti min ĉie laŭ la kondiĉoj, precipe laŭ la fakto, ĉu jes aŭ ne estas projekciilo kaj/aŭ tabloj.

La 6an de Septembro mi organizis komunan lecionon por la tri grupoj en la granda salono de Fongtil. Mi havis ses lernantojn, kiuj ne ĉiuj konis unu la alian kaj ni precipe ekzercis interparoladon, laŭtlekadon, komprenadon de laŭtlegitaj tekstoj, kaj iom da gramatiko (verboj, participoj). Post la tagmeza manĝo alvenis kvar pliaj lernantinoj por la kunsido. Kvankam fruas, mi volis pro mia foriro krei iun strukturon. Por landa asocio kompreneble certe tro fruas. Sed ni starigis la E-klubon de la urbo: 'La tri lagoj', laŭ Tasi Tolu, historie grava loko en Dilio. Mi aldonis la kvin respondeculojn al la administrantaro de la *Facebook*-paĝo, por ke ili ankaŭ povu krei eventojn en *Facebook*. Ni ankoraŭ faris kelkajn grupfotojn kun la bela nova banderolo (kun flago de Esperanto kaj de Orienta Timoro), kaj mi donacis libro-pakaĵon al ĉiu el ambaŭ grupoj, kaj *Poŝamiko* al ĉiuj ĉeestantoj.

Mi certas, ke ne ĉiuj miaj lernantoj daŭrigos lerni memstare, sed se kelkaj

daŭrigos, mi jam devos esti kontenta. Iel ajn mi provas instigi ilin, respondante iliajn mesaĝojn en *Facebook*, ĉu privatajn, ĉu en la muro de la grupo. Ankaŭ vi instigu ilin, korektu iliajn mallongajn frazojn, provu ekkomuniki kun ili!

Facebook-paĝo:

<https://www.facebook.com/groups/EsperantoOrientaTimoro>

Tagaj raportoj kaj fotoj:

<https://sites.google.com/site/esperantoenorientatimoro/instruvojaghoj/dua>

Heidi GOES, Belgio

Lernado kaj instruado de Esperanto en Azio

Kiel fluparoli kaj fluparoligi la aliajn?

Kiam mi memlernis E-on kiel dudekjarula studento, neniel mi povis imagi, ke iam ajn mi instruos ĝin. Mia denaska lingvo estas la kantona ĉina. Dum la pasintaj jaroj mi lernis eble pli ol dudek lingvojn, kaj eĉ ĉi-tempe mi lernas novan lingvon ĉiujare, foje pro neceso, sed pli ofte pro plezuro. Tamen inter tiuj lingvoj ne ĉiujn mi majstras. Kun kelkaj mi enamiĝis kaj daŭre progresis t.e. la franca, la japana kaj la bahasa-indonesia. Kelkajn mi rapide lernis kaj rapide forgesis t.e. la persan, la korean kaj la tibetan. Kelkajn mi eventuale majstris kaj eĉ instruis, t.e. la anglan, la sanskritan kaj E-on. Pro laboro en la universitato, kiu temas pri antikvaj manuskriptoj, ĉiutage mi laboras kun multaj lingvoj. Lingvoj ĉirkaŭas mian vivon kaj mi do havas multajn lingvajn spertojn, ĉu sukcesajn, ĉu nesukcesajn, kvankam la nesukcesaj spertoj estas pli multaj ol la sukcesaj. Do kredu, ke mi ne estas lingva geniulo!

Tuj post kiam mi ricevis mian Cseh-metodan diplomon en 1998 en Francio, mi ekinstruis E-on, komence en Honkongo/Ĉinio kaj poste ankaŭ en aliaj aziaj landoj, ekz. Nepalo kaj Japanio. Inter miaj lernantoj la plimulto estis azianoj. Ĉar fluparolantoj inter aziaj samideanoj estas malmultaj, ofte oni demandis min, kiel mi ekfluparolis ĝin. Tiam mi prirakontis miajn proprajn spertojn. Mi memlernis E-on el lernolibro dum tri monatoj. Komence mi ne povis paroli, eĉ ne unu frazon. Poste en Montrealo mi konatiĝis kun pluraj tre afablaj fluparolantoj, kiuj neniam krokodilis aŭ aligatoris kun mi. Inter ili estis Zdravka METZ, kiu tre severe paroligis min dum monatoj kaj dank

'al ŝi mia prononcado fariĝis klara kaj slaveca! Tamen dum eble du jaroj mi ankoraŭ ne povis fluparoli. Mi havis tiom grandan deziron fluparoli la lingvon, ke iunokte mi eĉ sonĝis en E-o! Malgraŭ mia balbuteco mi ekaktivis en diversaj E-aktivadoj – mi fondis klubon en mia universitato, fariĝis membro kaj komitatano en pluraj E-asocioj, partoprenis en kongresoj kaj kunloĝadoj, vojaĝis tra Eŭropo per Pasporta Servo, kaj multe korespondis kun samideanoj tra la mondo. Alivorte mi havigis al mi ĉiujn oportunojn imageblajn utiligi la lingvon. Iam dum mia triajara esperantisteco mi ekparolis ĝin flue. La transformo estis okulfrapa kaj magia.

Parolinte kun multaj aliaj fluparolantaj samideanoj, ŝajnis al mi, ke oni atingis sian fluparolantecon diversmaniere. Eble la vico ne gravas. Tamen estas kelkaj esencaj elementoj en la formulado, t.e. pasio, bona modelo kaj pacienco. Sed kio pri lernolibro, instrumetodo kaj ekzercado? Nu, mi ne diru, ke ili estas malutilaj. Sed verdire E-o estas tiel simpla, ke se vi jam lernis la lingvon dum jaroj kaj vi ankoraŭ ekzercas pri fraz-konstruado sen kapablo je spontana parolado, via lerno-metodo verŝajne ne estis la bona. Vidu, la problemo de lingvo-lernado por azianoj troviĝas ne nur en E-lernado, sed ankaŭ en la lernado de aliaj lingvoj. Do, ni nepre ne ripetu la eraron, ĉar interalie eterna komencanteco de E-o estas malbona propagandilo por ĝi. Ĉiukaze, ni ne analizu la erarajn metodojn; anstataŭe ni ekzameni la esencajn faktorojn de sukcesa lingvo-lernado.

Pasio - La komenca energio

Jen tre bela kaj taŭga metaforo, kiun mi aŭdis de S-ro HUGÛMOTO Tacuo el Kyoto, Japanio. Ĉiam necesas granda energio en la komenco de lingvo-lernado, samkiel aviadilo antaŭ ekflugo. Se mankas energio, la maŝino nur glitas surtere senrezulte dum longa tempo, aŭ fine en la maron. Tamen se sukcesas, post la ekflugo ĉio fariĝas facila kaj eĉ la flugado mem fariĝas aŭtomata. Kio estas tia energio? Eble amo aŭ pasio. Se vi havas nur pasivan diletantan intereson pri io, aŭ se vi havas tro da am-objektoj, tre verŝajne mankos al vi tia bezonata energio. Cetere tia pasio gvidu vin al sukceso, almenaŭ se temas pri lingvo-lernado. Senpasienco estas malamiko de lingvo-lernado. Studento de lingvoj nepre estu vigla, eĉ senhonte, ĉar oni ne timu fari erarojn. Vidu kiel la infanoj lernas lingvojn aŭ kiel vi mem lernis vian denaskan lingvon. Kiel instruisto, mi kuraĝigas la studentojn multe kaj vigle paroli pri temoj, kiuj vere interesas ili. Eble la studentoj devas demandi sin, kial ŝli volis lerni la lingvon? Kio estis la motivo? Eble ne ĉiuj

konas la celon de E-lernado en la komenco de lernado. Por mi la buntecon de la E-mondo kaj ties ĝojon mi malkovris nur, post kiam mi fariĝis fluparolanto. Tamen la motivo kaj la celo por mi estis tre klara. Mi volis fluparoli ĝin kiel la birdoj flugas, pro tutsimpla plezuro de libera esprimado farante belajn sonojn. Mi ja havis grandan pasion pri la lingvo ekde la komenco pro tia simpla amo. Eble ankaŭ la instruisto povas iel transdoni tian pasion al la studentoj sed finfine, pasio estas mistera, tamen tre necesa elemento de sukcesa E-lernado.

Bona modelo - Trovu ĝin!

Eĉ geniuloj iam iel lernis de la alia. Tamen ne nepre temas pri instruisto. Kompreneble instruisto povas fariĝi bonega modelo; ideale la instruisto estu via bona modelo. Tamen en Azio la koncepto de lernado foje fariĝas tro formala kaj metodisma, ke oni forgesas pri la fundamento de lingva instruado kaj lernado. La instruisto devas esti kompetenta. Majstrinte la lingvon, ŝli ne konu nur la teorion aŭ la instru-metodon, sed posedu ankaŭ kapablon progresigi la lernadon de la studentoj. Dum jaroj mi lernis la anglan lingvon de instruisto, kiu mem ne parolis la lingvon. Strange kaj ridinde, ĉu ne? Tamen eĉ hodiaŭ en Azio milionoj da studentoj lernis lingvon sen kompetentaj instruistoj. Kia koŝmara entrepreno! Samafero pri E-o. Estas multaj entuziasmaj E-instruistoj en Azio, kiuj ankoraŭ ne atingis la nivelon de fluparoleco. Mi admiras la klopodon, sed mi ne malseveras pri tiu ĉi punkto substrekenda, ĉar malperfekteco nur naskas la saman. Entuziasmaj progresantoj ne instru, sed trovu kaj subtenu pli taŭgan instruiston por plenumi tiun taskon. Vortoj el la buŝo de bona E-oratoro estas kiel perloj por la oreloj – mia japana amiko S-ino TAHIRA Masako ĉiam diris al mi. De bonaj oratoroj oni ne nur lernas bonan prononcadon kaj elparolon, sed ili fariĝas por vi dumviva modelo kaj ankaŭ daŭra inspiro, kiu estas tre necesa post la komenca pasia fazo.

Pacienco - la ŝlosilo al fina venko

Se vi havus grandan pasion fluparoli E-on kaj se vi jam troviĝas inter helpemaj fluparolantoj, certe ankaŭ vi fariĝos unu el ili. Sed kiam? Vidu, en Eŭropo centoj aŭ eĉ miloj da junuloj fariĝas fluparolantoj ĉiusomere dum kunloĝado, kundancado kaj kunbabilado. Oni lernas lingvon en la plej natura maniero, ne per libroj, sed per homaj interŝanĝoj. Necesas, ke troviĝu sufiĉe multaj fluparolaj junuloj en tiaj aranĝoj, ĉar kiel fajreroj la

lingva fajro disvastiĝas dank' al ili. En Azio ofte mankas ne nur al la studentoj la pasio kaj la bona modelo, sed ankaŭ tia fajra lingva medio. Senfajre kiel oni kuiru? Tamen feliĉe ĝenerale ne mankas al azianoj pacienco. Pacienco gravas en lingvo-lernado, ĉar oni neniam scias, kiam okazos la magia transformo. Estas kvazaŭ akvo bolanta, ekzistas pluraj faktoroj: Ĉu la ujo taŭgas? Ĉu la alteco helpas? Ĉu la fajro sufiĉe fortas? Simile fluparolanteco estas la rezulto de la plenumiĝo de pluraj faktoroj, ekz. prononcado, vortuzado, frazkonstruado ktp. Iom post iom tiuj faktoroj maturiĝas. Haviginte al si pasion, bonan modelon kaj aliajn helpajn kondiĉojn, kun pacienco oni daŭre remu ĝis la celo - fluparoleco.

Konklude

En azia klasĉambro oni ĉion lernas kaj multon forgesas. Iel la scio restas senviva kaj senutila kvazaŭ neludata muzikilo kaj neŝmirata farbo... kia ploriga afero! Lingvo estas vivanta afero. Eble ne ĉies vortoj regalas la orelojn de la aliaj; tamen viaj vortoj ne suferigu la aliajn! Azianoj, kiuj volas majstri E-on, devas rekonsideri sian lerno-metodon. Fluparoleco devas fariĝi klara celo en la komenco. Atingu la celon iel ajn, sed ne maltrafu ĝin survoje. La studento demandu sin ĉiam: „Ĉu mi progresas, ĉu mi proksimiĝas al la celo?” Oni ne obsediĝu pri iu ajn metodo. Instruistoj ne priokupiĝu enŝovi scion en la kapojn de la studentoj. Laŭ mia sperto pli bone estas, ke la instruistoj ebligu al la studentoj esprimi sin per sia peno???. Se mankas tiu necesa ŝtupo, la studento neniam posedos la kapablon elparoli spontane. Mi devas konfesi, ke mi estas malbona lingvo-instruisto, ĉar mi estas lingvisto kaj ĉar temas pri mia profesio, mi profesoras. Mi ĉiam tro analizas kaj analizigas al miaj studentoj; en mia fako tia metodo fruktodonas, sed ne en lingvo-lernado. Efektive lingvo-instruado estas ankaŭ tre speciala talento kaj estas malfacile trovi la perfektan E-instruiston. Dume tiuj, kiuj deziras fluparoli, fariĝu unue perfektaj studentoj. En mia kazo mi progresis sen klasĉambra instruisto. Mi traktis ĉiun fluparolanton kiel mian instruiston. Kun grandaj ĝojo kaj dankemo mi lernas, kiam ajn oni korektas min. Mi ne hontas pri miaj eraroj, ĉar vidinte ilin, mi iom post iom pliboniĝas. Ni ne plu laŭdu pri la ideala bona azia studento, silenta kaj obeema. Ve, ili estas teruraj lingvo-lernantoj. Malbonaj lernantoj estas tiuj pacemuloj, kiuj hezitas demandi kaj peti helpon, kaj diligente laboras senprogrese en silento. Tial mi ĉiam emfazas, ke lingvo-lernado estas senhonta afero. Petu helpon de



fluparolantoj. Multaj pretas helpi, ĉar tiuj, kiuj ĝuas la ĝojon de fluparoleco, certe ŝatus transdoni la saman al la aliaj. Se oni ne tolerus balbutecon en sia denaska lingvo, kiel kaj kial oni toleru eternan balbutecon de E-o?

Fluparoleco estu la normo kaj ne ia admirinda neatingebla revo. Kun pasio, sincero kaj pacienco, krei oportunon paroli, kunlabori, proksimiĝi, amikiĝi kun tiuj, kiuj jam atingis la celon, estas ofte garantio al sukceso. Cetere tio veras ne nur por lingvo-lernado!

„Tigro” (Bill M. Mak)

bill.m.mak@gmail.com, www.billmak.com

El la landoj kaj sekcioj

Ĉinio

Kursoj de la Internacia Somera Lernejo de Esperanto en Xi'an

La dua sesio de Internacia Somera Kurso okazis de la 13-a de julio ĝis 15-a de aŭgusto en la Monaĥejo Tiefosi, 80 kilometrojn de Xi'an (Siano). La projekto lanĉita en 2013 estas kunorganizata de ILEI-CN kaj Xi'an-a E-Asocio. Ĉi-jare aliĝis kaj partoprenis 14 lernantoj el Nepalo, Koreio kaj de Taivano, Xi'an kaj aliaj ĉinaj urboj. La kurson gvidis Majstro Miaohui (budhano). En la komencaj tri tagoj estis ekspresa kurso por komencantoj per nacia lingvo. De la 17-a de julio ĝis la 13-a de aŭgusto la Majstro gvidis BEKkurson laŭ la metodo de s-ro Dennis KEEFE. La 14-an de aŭgusto okazis ekzameno, kies teksto estas ellaborita de s-rino GONG Xiaofeng („Arko”) en la urbo Nanchang. Ĝojinde, ke ĉiu kursano sukcese trapasis la skriban kaj parolan ekzamenon. Arko, respondeculo de Internacia Somera Lernejo kaj prezidanto de ILEI-CN, disdonis atestilojn al la kursanoj kune kun Majstro Miaohui ĉe la malfermo de AMO 3 – seminario por aktivula maturigo en Siano. 14 kursanoj senpage partoprenis la seminarion, kiu donis bonegan ŝancon al ili por praktiki nian lingvon. Dum la 7-taga seminario ili aŭskultis pli ol 30 prelegojn kaj progresis rimarkinde rapide. Komence ili nur povis kompreni iomete kaj balbute parolis kun aliaj, sed



iom post iom ili komprenis plejparton de la prelego kaj aktive partoprenis la diskutadon. Ilia partopreno portis freŝan forton al nia seminario.

Trejni junulojn kaj instruistojn daŭre estas la ĉefa tasko de ILEI-CN. Venontjara kurso estas preparata kaj alilandaj instruistoj estas bonvenaj.

GONG Xiaofeng („Arko”)

Germanio

Helpu por nova, publika Esperanto-Biblioteko en Herzberg

Laŭ la decido de la urba konsilantaro eblis instali Esperanto-sekcion en la urba biblioteko, kiu estos vizitebla dum la regulaj malfermhoroj, kaj ni esperas ricevi ankaŭ arkivejon. Por tuj realigi la projekton, por loki tie ekz. la pedagogian-metodikan faklektaĵon de Interkultura Centro Herzberg, arkivon de ILEI ktp. ni bezonas tujan financan subtenon.

Bv. legi detalojn ĉe <http://esperanto-urbo.de> Novaĵoj, aŭ kontaktu min: zsofia.korody@esperanto.de

Zsófia KÓRÓDY

SALO 9 – denove plena sukceso

Post la lastjara Somera Arbara Lernejo (SALO), kiu estis el pluraj vid-punktoj escepta pro la samtempe okazanta 46-a ILEI-konferenco en Herzberg/Sieber ankaŭ en 2014 laŭ la jam kutima strukturo kaj enhavo okazis la kunferiumado de ĝemelurbaj gelernantoj el la germana Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo kaj el Góra, Pollando.

La pedagogia celo estas la sama ekde la komenco: ni proksimigu, amikigu grupeton de dekjaruloj el la ĝemelurboj per uzado de Esperanto, per lernado de neŭtrala komunikilo, kiun eĉ la komencantoj rapide alproprigas

jam dum la unuaj kelkaj tagoj, por ke ili povu uzi ĝin dum la tuta semajno. Dum komuna lernado, tuttaga kunestado, ludado, sportado, libertempaj aktivecoj la lingvouzado aŭtomatiĝas, la kursanoj devas kompreni kaj sekvi la klarigojn de malsamlingva instruisto, ludgvidanto, respondi al demandoj, lerni esprimi siajn bezonojn, sentojn kaj pensojn.

La sukceson de tiutipa kunferiumado pravas, ke pluraj lernantoj regule partoprenas ĝin, volonte renkontiĝas de jaro al jaro kun la partnerlandaj geamikoj kaj eluzas la eblon por komunaj travivaĵoj.

Dank' al subvencioj fare de la du urboj, dank'al la German-Pola Junulara Fondaĵo (*Deutsch-Polnisches Jugendwerk*) kaj la regiona junulara organizo *Kreisjugendring*, eblas finance subteni tiujn renkontojn, kiuj tamen certe ne realiĝus sen la organiza laboro kaj volontula instruado de bonvolemaj instruistoj, klubanoj kaj helpantoj de Interkultura Centro Herzberg kaj Esperanto-Klubo Góra.

Estas ĝojige, ke la urboj konsideras la partoprenantojn 'junaj delegitoj', kiujn ĉiujare en la koncerna organizanta urbo oficiale akceptas la urbestro de Herzberg resp. la urbestro de Góra. En ĉi tiu jaro ni havis la ŝancon eĉ por publika prezentado fare de la ĝemelurba junularo en somera urba festo, kie la lernantoj faris bonegan varbagadon ĉe Esperanto-informtablo kaj poste ni komune kantis la Eŭropan Himnon en la germana, en la pola, en la hungara kaj en Esperanto.

Zsófia KÓRÓDY

Italio

Esperanto kaj novaj teknologioj

Raporteto post seminario dum la 81a Itala Kongreso de Esperanto



Pri ĉi tiu ĝenerala temo de la kongreso prof-ino Ilona KOUTNY [vd la foton] el la Universitato de Poznań (Pollando) gvidis seminarion A en Fai della Paganella, Trenta regiono, inter la 23a kaj la 30a de Aŭgusto 2014.

Ŝi skizis terenojn de komputa lingvistiko, pri-traktante antaŭ ĉio problemojn kaj eblojn de homa kaj komputila komunikado.

La nunaj komputilaj sistemoj jam kapablas regi sufiĉe bone la fonetikan, morfologian kaj sintaksan flankojn de la lingva komunikado, sed la semantika flanko havas ankoraŭ nesolvitajn proble-

mojn. Al maŝina tradukado povas favore kontribui iu interlingvo, kaj E-o, pro sia specifeco, tiucele taŭgas, malgraŭ kelkaj malfacilaĵoj, ĝi havas pli da ŝancoj por la algoritmigo. Esperanto estas kostefika interlingvo, kiu tre utilis al maŝina tradukado inter pluraj lingvoj samtempe kiel pontolingvo ĉe internaciaj institucioj, ekz. Unuiĝintaj Nacioj kaj Eŭropa Unio.

Ekde la 70aj jaroj de la pasinta jarcento estis faritaj projektoj, inter kiuj ESPAROL (E-o en parolsintezo) kaj DLT (E-o kiel interlingvo), kiuj atestas la gravecon de Esperanto.

La lastan parton de la seminario prof-ino Koutny rezervis por pli praktike informi pri la nuna situacio rilate al la retaj helpiloj por Esperanto, precipe pri vortaroj, nepraj al la tradukistoj. La lastan tagon ĉeestis ankaŭ prof. Zbigniew GALOR, sociologo, kiu parolis pri interreta komunikado, klarigante, ke ofte ĝi ne estas vera komunikado. Ŝajnas, ke E-o troviĝas en bona pozicio en la interreto.

En la 16-hora seminario partoprenis ĉiutage inter 10-25 diverslandaj gesamideanoj, kiuj pozitive interrilatis en agrabla etoso.

Mirella DE MARTINI, Italio

Japanio

La 4a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA)



De la 7a ĝis la 10a de oktobro, en OOMOTO-Centro en Kameoka, Japanio, okazis la 4a ISOA organizita de la japana sekcio kunlabore kun la sekcioj en Ĉinio kaj Koreio. Ĝin partoprenis entute 38 personoj; 16 el Ĉinio, 9 el Koreio, 1 el Vjetnamio kaj 12 el Japanio. La seminaria temo estis *Kapablo de instruistoj/gvidantoj por bona gvidado*. Jam dum la lastaj tri ISOA-j ni havis komunan komprenon pri diversaj malfacilaĵoj, kiujn multaj aziaj lernantoj ofte renkontas dum la lernado de E-o. Surbaze de tiaj antaŭe difinitaj problemoj, en ĉi-foja seminario ni montris kelkajn ekzemplojn kaj modelojn de lecionoj, de kiuj oni havis certajn reagojn. Prezentoj de la *Panorama metodo* fare de s-ro KINUGASA Hiroshi kun plia klarigo de praktiko de la metodo fare de YAMAKAWA Setuko, *Rakonto metodo* pere de s-ro KIM Seon Wook („Suno”) kaj la kurso utiliganta la *Fundamentan Krestomation* fare de s-ro PARK Yongsung („Nema”) altiris grandan intereson de la seminarianoj. Prof. GONG Xiaofeng („Arko”) parolis pri la temo *Kiel efike altigi la kapablon*

de E-instruantoj? kaj donis al ni konkretajn vidpunktojn por pridiskuti necesajn trajtojn por bone gvidi lernantojn. Intertempe S-ro WEI Yubin („Jado”) raportis tre pozitivan rezulton de E-instruado en sia bazlernejo, kie daŭras provo por konfirmi la lernofaciligajn efikojn de E-o. S-ro LI Weilun ankaŭ montris kun bildoj E-lecionojn en pekina bazlernejo. Ĉiuj ĉi paroloj kaj prezentoj estis interesaj kaj stimulaĵoj kaj la postaj diskutoj estis tre aktivaj. Prof. KIMURA Goro Christoph faris specialan prelegon pri *Kiel E-on en Orienta Azio Instrui?* Laŭ li, E-o ne estas etna/fremda/nur eŭropa lingvo kaj li emfazis, ke instruantoj ne korektu primitivajn esprimojn de komencantoj nur pro tio, ke ili estas „nekutimaj”, sed kuraĝigu ilin mem trovi kreivan esprimon. Prof. Kimura aldonis, ke konscio pri lingva kultivado/flegado estas parto de instruistaj/gvidantaj kapabloj. La prelego estis tre enhavoriĉa kaj aŭskultinda. La lastan tagon, en la 10a de oktobro, la seminarianoj ĝuis ekskurson en Kioto, turisma urbo kun longa historio. Kaj matene, la 11an, la plejparto de la seminarianoj kune vojaĝis al la urbo Obama kaj partoprenis en la 101a Japana E-Kongreso.

ISIKAWA Tiekō, estrino de la Japana ILEI-sekcio

Kroatio

Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo (19-22 Septembro 2014)



Kroatiaj esperantistoj jam la duan fojon organizis tiun ĉi internacian renkontiĝon en Bjelovar. Ĉi-jare ĝi estis dediĉita al la partnera lando Hungario. La plimulto de la programoj okazis dimanĉe, kun partopreno de

pli ol 100 esperantistoj. En la biblioteko Petar Preradović ni malfermis la ekspozicion „Nekonata Hungario”. Poste prelegis Radenko MILOŠEVIĆ pri la okjarcenta kunvivado de kroatoj kaj hungaroj. Ankaŭ la tradicia deklamkonkurso ne mankis, ĝin gvidis Marija JERKOVIĆ. Kiel la plej bona deklamantino estis proklamita Katarina SOKAČ, el la Gimnazio d-ro Ivan Kranjčev en Đurđevac, kaj ne malpli sukcesaj estis Dora JAMBROŠIĆ kaj Lucija OROZ el la Elementa lernejo Davorin Trstenjak Zagreb kaj Marija HALUSEK el la Elementa lernejo Viktor Šignjar el Virje. Ekster konkurenco deklamis du plenaĝulinoj: Mihaela CIK el Đurđevac („Fingroringo de mia morta patrino” de Željko SABOL) kaj Judit SZÜCS el Pápa, Hungario (*Cantata profana* de Béla BARTÓK). Krom tio okazis prezentado de pluraj nove eldonitaj libroj, malfermo de pentraĵ-ekspozicio de la hungara e-istino Orsolya OMBÓDI en la kafejo Zagorje, la kantado kaj dancado de la zagreba infangrupo „Gajuletoj” en Hotelo Central [vd la *foton sur p. 31*] kaj multo pli. Dankon ankaŭ al la loka ĉef-organizanto, Josip PLEADIN.

József NÉMETH, Hungario

Slovakio

Poezia SES-umado

La jaro 2014 estis por Somera Esperanto-Studado (SES) unika minimume el du vidpunktoj: la unuan fojon okazis SES ankaŭ en Moskvo, kaj la unuan fojon inter la instruprogrameroj de la slovaka SES, kiu okazis jam la 8-an fojon, ĉi-jare denove en Nitra, estis envicigita kurso „E-literaturo kaj kulturo”.

La kurson gvidis du famuloj:

– la hispano Jorge CAMACHO, de kiu mi almenaŭ laŭtitole konis la novelon *La Majstro kaj Martinelli*

(iam mi devos ĝin legi), kaj pri kiu mi eksciis, ke li kunredaktas la literaturan revuon *Beletra Almanako*.



– Nicola RUGGIERO, italo nun loĝanta en Islando, komitatano de Esperantlingva Verkista Asocio EVA, kiu en Nitra baptis sian novan poemaron, kaj krome ĝojigis kaj ĝuigis min (kaj nin ĉiujn) per siaj priaŭtoraj bildprezentaĵoj.

Unue ni eksciis pri periodigo de la Esperanta

literaturo laŭ SUTTON, kio speciale estis interesa por mi, ĉar mi iam legis periodigon laŭ Eduard TVAROŽEK. Laŭ mia gusto estis ankaŭ mencio pri kelkaj noveloj kaj romanoj, inter ili de la ĉeĥo Karolo PÍČ, pri la Ĉu-romanoj de Claude PIRON, pri Trevor STEELE, kies romanon *Sed nur fragmento* mi legis ĉi-jare. Poste jam sekvis poeziaĵoj, kiuj por mi ne estis tiom allogaj kaj konataj, sed sen partopreni en ĉi seminario mi neniam estus leginta ilin. Sed dank' al *youtube* mi konis minimume *Ebrio* de William AULD – ankaŭ vi serĉu ĝin, ĉarme muzikigita, vi same ĝuos ĝin kiel mi! Sekvis kelkaj poemoj de kelkaj klasikuloj, pri kiuj almenaŭ kelkaj el inter ni arde diskutis, kaj aparte ni traktis la italon Mauro NERVI. Inter la nuntempaj verkistoj ne povis manki nia preleganto Nikola kaj mi ĝoje ekkonis ankaŭ kelkajn nomojn, kiel Gerrit BERVELING, bofilon de mia bedaŭrinde jam forpasinta multjara leteramikino Rie, aŭ Balázs WACHA, kiun mi konas kiel kontribuanton de *edukado.net*. Kun vera ĝuo mi aŭdis *Budapeŝta ekzameno* de Sándor SZATHMÁRI, pri kiu ni, dividitaj en grupoj, ricevis taskon verki propran version. Nia grupo ne sukcesis plenumi tiun taskon, sed dum la internacia vespero ni ĝuis rezulton de la laboro de la alia grupo, kiu ege sukcese akomodis la verketon al la kondiĉoj de la kuranta SES kaj meritis aplaŭdon. Alia interesa tasko estis verki hajkojn (kiel vi verŝajne scias, hajko estas japandevna poemoformo el tri versoj de po 5, 7 kaj 5 silaboj), eĉ malhajkojn (en 7-5-7 silabaj versoj). Alifoje ni ricevis bildetojn kun peto verki prozaĵojn pri ili – kaj poste ni prezentis niajn verketojn – la rezulton vi povos legi en la sekva *Beletra Almanako...* La plej malfacila tasko estis verki kanton laŭ la destinitaj silaboj, sed kelkaj eĉ tion sukcese faris!

Do, entute vere ĝuinda parto de SES! Se vi mem volas ion similan sperti, ne hezitu kaj ankaŭ vi venu venontjare!

Magdaléna FEIFIČOVÁ (Fejfi), Slovakio

Pri la fotokonkurso

Ŝajnas, ke ni ŝatas la kutimajn grupajn fotojn... Mi ricevis nur 9 fotojn por nia konkurso. La ĵurio ne devis labori longe.

Unuanime la ĵurio aljuĝis la unuan premion al Marija BELOŠEVIĆ el Kroatio por ŝia foto *Go-ludado*. Jen komento de la ĵurio: Laŭ nia vidpunkto la foto 'Belošević UK 2014 Movada Foiro' estas la plej bona el ili. El la foto videblas harmonio tra eŭropaneco kaj azieco, maljuno kaj junco, la

amikeca ludo kaj foira servo; plie vidiĝas Esperanto-vestaĵo. Cetere oni povas certi, ke en tia ludado en gaja etoso la uzado de la lingvo tute nature progresas.

La dua premio iras al la foto *Kvin Vortoj* de Sonia DAUBERCIES el Svislando. Ĝi montras grupon en propagando pri aktivaĵoj.

Mireille GROSJEAN

Kalendaro

Kongreso, konferenco, kunveno, en rilato kun ILEI

13 - 16 Majo 2015

Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto, Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds, (Svislando)

Diversaj prelegontoj (konfirmota): Ilona Koutny (Pollando), Katalin Kováts (Nederlando), Peter Balaž (Slovakio), Angela Tellier, Essex (Britio), Zsofia Korody (Germanio) kaj aliaj.

Aliĝu ĉe mirejo.mireille@gmail.com

22 - 31 Majo 2015

Germana Esperanto-Kongreso kun fakseminario, trejnado en Hameln postkongreso kaj seminario en Herzberg am Harz

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

26 - 29 Junio 2015

Landkongresoj de Kanado kaj de Usono en Detrojto, Miŝigano, Usono, kaj interne de tiu evento la jarkunsido de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE) okazos la 28-an de Junio.

Por pli da detaloj bonvolu kontakti Ronald Glossop <rglossop@mindspring.com>.

17 - 25 Julio 2015

Tutsemajna Konferenco de ILEI, Oostende, Belgio

Informoj en www.ilei.info



Lingvokurso

17 - 25 Aprilo 2015

4-a PRINTEMPaS - en Baugé, Francio. Intensaj kursoj kun Zsófia Kóródy el Herzberg, Christophe Chazarein el Okcitanio kaj Jean-Luc Kristos el Aŭvernjo. Poste eblas KER-ekzameno. Inf.: Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio.
Rete: kastelo@gresillon.org

30 Junio - 9 Julio 2015

Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) en Universitato William Peace en Raleigh, Nord-Karolino, Usono.

Por pli da detaloj bonvolu kontakti Ellen Eddy <Eddyellen@aol.com> aŭ Chuck Mays <charles.o.mays@gmail.com>.

11 - 19 Julio 2015

Somera Esperanto-Studado

La 8-a renkontiĝo de lernantoj de 'lernu.net' (sed ne nur de ili) en urbo Martin, Slovakio. Antaŭtagmeze lernado, posttagmeze ekskursoj, prelegoj, ludoj, vespere koncertoj, filmoj, amuzado. Inf.: Peter Baláž, petro@ikso.net

Instruista trejnado

12 – 21 Decembro 2014

Herzberg am Harz, Germanio

Intensa lingvolernado, metodika trejnado kaj fakseminario

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

27 Aprilo – 3 Majo 2015

Herzberg am Harz, Germanio

Intensa lingvolernado, metodika trejnado kaj fakseminario

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

03 – 17 Julio 2015

Herzberg am Harz, Germanio

Antaŭ la ILEI-konferenco: **2-semajna intensa lingvolernado, metodika trejnado sub la gvido de Zsófia Kóródy**

Aliĝu ĉe esperanto-zentrum@web.de

RENKONTOJ KUN LA HISTORIO, PENSOJ PRI LA PACO

Okcidenta Flandrio konservas memorojn kaj memoraĵojn el ŝlosilaj bataloj de ambaŭ mondmilitoj. Flandrio kaj tuta Belgio estas trezorejo konservanta pintvalorajn verkojn de arkitekturo kaj pentroarto el la kultura historio de Eŭropo kaj spurojn de ĝia ekonomia kaj socia evoluo. Ĉio ĉi kaj multo alia malfermiĝos al konferencanoj por ĝuo dum la konferencaj ekskursoj. Kaj por pripenso dum konferencaj prelegoj kaj diskutoj traktantaj la konferencan temon:

Grandan pacon post la grandaj militoj

Unu jarcenton post komenco de la Granda Milito, per la programo sub la slogano *Neniam plu milito*, Flandrio volas kondamni la militan perforton kaj omaĝi la multnombrajn viktimojn kreante malferman socion de toleremo, paca prospero kaj aktiva internacia orientiĝo. ILEI per sia konferenco aliĝas al realigado de tiuj celoj trovante en la flandra projekto komunajn temojn kiel interkultura dialogo kaj internacia kompreniĝo. En la



Atlantika muro, subĉiela muzeo je 15-minuta tramveturo ekster Oostende, unu el konferencaj ekskursceloj. Ĝi konservas parton de la sistemo de fortikaĵoj (inkluzive de artiliaj baterioj, radaraj stacioj, obstakloj, subteraj koridoroj, restadejoj, stokejoj) konstruita de nazia Germanio laŭlonge de la atlantika marbordo de Eŭropo dum la Dua Mondmilito.

Pli profunden en la historion gvidas la muzeo "Fiŝista vilaĝo" en la sama muzea komplekso sur verdaĵplena tereno agrabla por promeno.

Aliaj ekskursoj gvidos tra okcidenta Flandrio kaj al la ĉefurbo Bruselo proponanta siajn vidindaĵojn el la historiaj kaj modernaj tempoj.



simpozia parto de la konferenco, kun partopreno de neesperantistaj kaj e-istaj fakuloj, estos traktata iom pli specifa

temo, siamaniere emfazata ankaŭ en la strategio de UEA:

Lingva justeco kaj paco: Kiaj defioj por la nuna mondo?

La konferenco akiris moralan kaj materian subtenon de la urbo Ostendo, kiu sian prosperon apogas grandparte per turismo rekonante E-on kiel favoran faktoron por la turisma ekonomio kaj malfermiteco de la urbo al la tuta mondo. La forta loka E-grupo akiris kaj plu flegas tiun rekonon per bone organizata kaj trafecelita malferma agado. Tio garantias ankaŭ bonan organizon de la konferenco.



Bruselo: Rigardo el Atomiumo al Mini-Eŭropo, replikaro el eŭropaj ĉefurboj

Programkonturoj

La konferenco praktike komenciĝos vendredon posttagmeze, 17.07.2015, per akcepto de konferencanoj kaj interkona frandvespero en la konferencejo (*De Ploate*). La solena inaŭguro okazos sabaton antaŭtagmeze en la Urbo-domo kaj finiĝos per koktelo regale de la urbo al la konferencanoj. Ekde dimanĉo la programo disvolviĝos laŭ la tri tradiciaj programfadenoj: faka/eduka, kultura/distra kaj organiza, inkluzive de lingva festivalo, simpozio, ekskursoj kaj bankedo. Konferencanoj povos ĉiutage, post la vespera distra programo, aliĝi al aliaj turistoj kaj lokuloj sur la ostenda strando por ĝui la festan etoson, kiu daŭros la tutan konferencan semajnon.



Lingva festivalo, detalo el Matanzas, 2010: Prezento de indiĝenaj lingvoj de Latinameriko

La konferenca programo finiĝos vendredon, 24.07.2015, per adiaŭa vespero. La vera adiaŭo okazos sabaton, 25.07.2015, post la matenmanĝo, por daŭrigi al UK en Lillo per duhora trajnveturo. Pro abundo de presinda materialo kaj limigita spaco en IPR, ne eblas ĉi tie prezenti ĉiujn detalojn de la konferenco, sed la necesaj informoj, inkluzive de reta aliĝilo kaj mendiloj por la bankedo, ekskursoj kaj aliaj servoj, estos distribuataj tra retlistoj, la konferenca retpaĝo (www.ilei.info//agado/Ostendo2015.php), sociaj retoj kaj aliaj komunikkanaloj. **Bonvenon en Oostende!**

R. Petroviĉ, estrarano pri konferencoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.rs>

Aliĝilo

por la 48-a konferenco de ILEI, Oostende, 17-25/07/2015

- Nomoj: Persona _____ Familia _____
Naskiĝjaro _____ Profesio _____ Ino Viro
 - Datoj (jjjj-mm-tt) de: alveno _____ foriro _____
 - Lando _____ Kodo, urbo _____
Loĝadreso _____
Retadreso _____ Telefono _____
 - Mi kotizas _____ EUR kiel (elektu unu el la kotizkategorioj kaj vidu la kotiztabelon sur la sekva paĝo):
 membro de ILEI, ne membro, junulo, handikapulo.
 - Mi pagas _____ EUR por loĝado kun mantenmanĝo (vidu klarigojn sur la sekva paĝo) kaj kun / sen vespermanĝo en ĉambro:
 unupersona dulita kvarlita seslita
 - Mi manĝas: vegetare vegane koŝere halale ordinare
 - Mi deziras loĝi kun _____
 - Mi pagas _____ EUR por helpo de LKK trovi loĝejon en alia hotelo.
 - Mi kontribuas _____ EUR por ILEI-agado tra jena(j) kaso(j) / fonduso(j) / agado(j): _____
 - Mi gvidas grupon de _____ (enskribu la nombron) komencantoj el mia lando, kiuj aliĝis al la konferenco laŭ la aldonita listo.
 - Mi komprenas, ke la aliĝo validas nur post kompleta pago en unu el la jenaj manieroj (indiku vian pagmanieron):
 Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A. Aldonu 5 € se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.
 Al ILEI-konto ĉe UEA *ilek-a*, indikante "ILEI-konferenco 2015"
 Ene de Belgio, bonvolu komunikiĝi kun LKK tra s-ro Marc Cuffez <flandrio@hotmail.be >.
 - Mi konsentas / ne konsentas (elektu unu) ke mia adreso aperu en la listo de partoprenantoj!
 - Mi komprenas kaj akceptas la partoprenkondiĉojn kaj regulojn el la Konferenca Regularo, p. 6-9 (ilei.info/dok/regularo_konferencoj.rtf)
 - Mi bezonas / ne bezonas invitilon (Pasporto n-ro _____ de la ŝtato _____ valida ĝis _____).
- Loko, dato _____ Subskribo _____

Kotizoj

- A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.
B. Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko, kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

Aliĝperiodo:	ĝis 28.02.2015		ĝis 31.05.2015		post 31.05.2015	
Aliĝkategorio:	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI (1)	50 €	30 €	60 €	35€	70 €	45 €
Ne-membro	65 €	40 €	75 €	45 €	90 €	55 €
Junulo (2), handik. (3)	25 €	15 €	30 €	20 €	35 €	25 €

(1) Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro 2015;

(2) Junulo: kiu naskiĝis post la 31-a de Decembro 1985.

(3) Handikapulo. Bonvolu sendi al ILEI atestilon.

Loĝprezoj validaj ĝis 28.02.2015

La junulargastejo *De Ploate*, kiu gastigas la konferencon, ofertas loĝeblon kun matenmanĝo. Konferencanoj, kiuj deziras loĝi pli lukse en proksimaj hoteloj ĉirkaŭ la konferencejo, povas peti informojn kaj asiston de LKK kontraŭ 5 EUR pagendaj kun la kotizo.

Ĉambroj en la junulargastejo estas 2-, 4- kaj 6-litaj, kun la eblo uzi kelkajn dulitajn ĉambrojn unupersone. Eblas aldone aboni vespermanĝon en la sama konstruaĵo kontraŭ 10EUR-a plialtigo de la loĝprezo. Dum la lunĉpaŭzo eblos aĉeti diverspreze manĝon en la sama junulargastejo aŭ en proksimaj restoracioj.

En la ĉi-suba tabelo estas prezentitaj la sumaj prezoj por unu persono en diversaj ĉambro-kategorioj por la tuta konferenca semajno, komence kun tranokto la 17/18an de Julio kaj fine kun la matenmanĝo la 25an de Julio.

Ĉambrokategorio	Loĝado kun matenmanĝo	Plus vespermanĝo
Unupersona	320 €	390 €
Dulita	224 €	294 €
Kvarlita	192 €	262 €
Seslita	160 €	230 €

La vespermanĝo la 17-an de Julio ne estas inkludita, ĉar tiun vesperon okazos la interkona frandvespero kun abundo da naci-specifaj manĝoj, kiujn konferencanoj mem alportos ĉiu el sia mondoparto, laŭ la

konferenca tradicio de ILEI. Konferencanoj, kiuj mendos bankedon (ĵaŭdon vespere, 23.07.2015) povos laŭdezire ricevi repagon de 10€ anstataŭ la tiutaga vespermanĝo. Mendilo por la bankedo kaj konferencaj ekskursoj estos publikigita aparte en la retejo de ILEI kaj alimaniere. Por loĝmendoj post la 28-a de Februaro 2015 la prezoj estos pli altaj depende de pluaranĝo kun la junulargastejo kaj de la nombro de aliĝintoj.

Programkontribuoj

Viajn kontribuproponojn por la konferenca programo (prelego, kurso, diskutrondo, muzika/danca programero, prezento de nacia lingvo, frandaĵoj por la interkona frandvespero k.s. bonvolu priskribi en aparta paĝo aldone al la aliĝilo, aŭ en la tiutema rubriko de la elektronika aliĝilo.

El la Konferenca Regularo

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco. [...]
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de Junio de la konferenca jaro.
8. La Estrarano pri Konferencoj rajtas haltigi ĉiun agadon koncerne ILEI-Konferencon, kiu ne konformas al ĉi tiu Regularo. [...]
9. Principe la ĉefa administrado kaj librotenado de ILEI-Konferenco estas prizorgata de la Kasisto de ILEI. [...]

Vian aliĝilon bonvolu sendi paperpoŝte aŭ rete (skanaĵon aŭ elektronikan kopion) al la kasisto de ILEI:

William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>, kun porinforma kopio al la estrarano pri konferencoj <radojica.petrovic.rs@gmail.com>

Elektronikan aliĝilon vi trovos en nia retejo:

<http://www.ilei.info/agado/Ostendo2015.php>

Estrarano pri konferencoj, Radojica PETROVIĆ

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Mireille Grosjean, Leysester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Tiekó Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi. Estrare: Penny Vos.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Ilona Koutny, Bharat Ghimire, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”..

Enmovadaj partneroj (entute 14)

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola**

Antskog, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj

Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.

Retadreso: *redaktanto@edukado.net*.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de*.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*.

Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI:

Stefan MacGill.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Euro*po) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, *monique.arnaud@aliceadsl.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. **Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <moerbeek@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 13-an de novembro 2014,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2015.**

***Juna Amiko* pretas veni al vi.
Invitu ĝin! Abonu!**



Orienta Timoro: Lernantinoj amuziĝas ekzercante dialogon uzante la unuajn frazojn, kiujn ili lernis (en la oficejo de la nacia radio) (vd. p. 19)



Orienta Timoro: La jenaj libroj kaj kd-oj eniros la moviĝantan bibliotekon. Tiu vizitas lernejojn en Dilio kaj en proksimaj distriktoj, kiuj ne havas propran bibliotekon. Maldekstre la direktoro Paulo H. Ximenes (vd p. 19)



Oostende invitas:
Renkontu la historion pensante pri la paco